

La internacia Lernejo,
kiu kunvenigis 150 infanojn el kvin landoj de la 14-a ĝis la 22-a de majo 1977
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 734, 1977.11.02 & 04 & 05

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Inter la gravaj esperanto-renkontiĝoj de tiu-ĉi jaro sendube estas mencienda la **Internacia Lernejo**, kiu kunvenigis 150 infanojn el kvin landoj ekde la 14-a ĝis la 22-a de majo. Ĝi estis la rezulto de eksperimento pri kunordigita instruado de esperanto al 10- kaj 11-jaraj gelernantoj.

A.- Ni diros hodiaŭ kelkajn vortojn pri tiu ĉi Internacia Lernejo laŭ raporto de Helmut Sonnabend, la prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiu estis unu el la instruistoj venintaj al Saint-Gérard en Belgio kun siaj gelernantoj. Tiu ĉi raporto tagon post tago priskribas la grandan aventuron labor-plenan por ĉiuj : gelernantoj kaj geinstruistoj kaj gehelpantoj.

Cl.- Kiel ĉiuj povas imagi, tiu ĉi aventuro ne disvolviĝis sen kelkaj disciplinaj problemoj. Jen kiel Helmut Sonnabend priskribas la unuan vesperon : « *Ĝis la 22-a horo ĉiuj estis alvenintaj en la junulara domo, enloĝiĝis en la ĉambroj duope, kvarope aŭ ses- ĝis ok-ope. Bruega renkontiĝo de la internacia gejunularo. La internacia kolegaro obstine luktadis por enlitigi la geknabojn. Je la unua horo iom kvietiĝis la internacia junularo ; fizike elĉerpita la internacia kolegaro ekfalegis kaj dronis en la litojn !* »

A.- La dimanĉon organiziĝis la klasoj, entute ok. La instru-fakoj estis esperanto, geografio, Eŭropo, matematiko, sporto, kanto kaj desegnado. La instruistoj venintaj el Germanio: gesinjoroj Peek, Ruff kaj Sonnabend, el Francio: gesinjoroj Magadure kaj Benistant, el Nederlando: gesinjoroj Hagedorn, Mensen kaj Van Tol kaj el Zagreb: fraŭlino Hudeček, konatiĝas kun sia nova klaso internacia, kiu grupigas dudekon da geknaboj el kvin landoj. Ne nur dum la instruado ili zorgas pri la infanoj, sed ankaŭ por la manĝoj. Kaj vespere, kiam fine la junularo ekdormas, ili kunsidas por fiksi la programon de la venonta tago kaj analizi tiun, kiu estis ĵus plenumita.

Cl.- La lundon 16-an de majo komenciĝis la instruado. Jen ni citas al vi erojn el la sama raporto de Helmut Sonnabend : « *Ĉiu klaso ricevis horar-planon. La stud-horoj estas limigitaj je 30 minutoj por ne tro streĉi la junajn infanojn. Impres-forte estis nun la lern-laboro inter instruistoj kaj gelernantoj. Interesa konstato estas, ke la infanoj efektive lernas pere de la Internacia Lingvo. Ĉu en komuna lernado de esperanto, ĉu en aliaj fakoj, la infanoj atente sekvis la instruadon kaj komprenis !* »

A.- Tiun ĉi unuan tagon malagrabilis bedaŭrinda afero. Ni citas : « *Dum la tagmanĝa paŭzo estas granda ekscitiĝo. Preskaŭ ĉiuj infanoj estas kolektitaj de pluraj gekolegoj en la granda koridoro. Ili ne plu estas en la ĉambroj. Iu frenezulo estis pafinta kvin kuglojn al la junular-gastejo. Unu trafis nederlandan patrinon kaj vundis ŝin je la nuko. Dank'al dio, ne tiel grave, tamen la sinjorino devis restadi kelkajn tagojn en la loka hospitalo. Kaptita jam estis la pafinto saman posttagmezon. Lia sinkulpigo : mi malamas la eklezion ! Trankviligi la infanojn kaj kvietigi la tutan instruatan atmosferon daŭris sufiĉe longe. Moderna tempo : ĉu terorismo nun de la komenco apartenas al la Internacia Lernejo ?* »

Cl.- Malgraŭ tiu ĉi malagrabla aventuro la instruado iris sian planitan vojon. Kaj la mardon la instruado jam tute glate funkcias. Sed montriĝas necese aktivigi la infanaron posttagmeze kaj post la vespermanĝo per sportaj ludadoj, konkursoj, kantadoj, prezentadoj, ktp. La merkredon la infanaro vizitas Bruselon kaj la batalejon Waterloo, kie Napoleono malvenkis. Kaj vespere la vizitintoj revenas kun la kapo plena je agrablaj rememoroj kaj en la mano reproduktion de Männeken Piss aŭ pupon.

A.- La ĵaŭdon pli kaj pli boniĝas la lernada disciplino. La eŭropaj infanoj estas vizitataj de triopa gejunula grupo, kiu intencas televide filmi ilin en la diversaj klasoj. Ĝuste tiuj ĉi klasoj laboras konsiderante la prezentadon kaj ekspozicion, kiuj konkludos la lernejan eksperimenton je la sabato.

Cl.- La adiaŭa vespero jam disvolviĝis la saman vendredon, kaj ĉiuj, ĉu francoj, belgoj, nederlandanoj, jugoslavoĵ aŭ germanoj, prezentis kulturaĵon de la propra nacio.

A.- La sabaton konkludis grava kunveno ekde la dua horo posttagmeze. Ĉiuj infanoj estas pretaj por montri al la ĝenerala inspektoro de Belgio, sinjoro Andreanne, kaj al kelkaj aliaj lerneaj inspektoroj, kiel disvolviĝas la laboro en internaciaj klasoj. Sekvis en la kapelo de Saint Gérard longaj paroladoj. La publiko sidis kaj la infanoj devis stari. Ili prezentis sin. Ne plu estis sovaĝa malordo kiel komence de la semajno. Regis nun komuna sento de unueco, de amikeco, esprimanta sin en kantado kaj spektakleto. Pro la bonega prezentado ĉiuj ĉeestantaj gastoj kore aplaŭdis kaj la inspektoroj poste rigardis kun intereso ekspoziciejon. Sed subite alvenis neinvititaj esperantistoj, kiuj komencis daŭre interrompi la programitan planon de la ceremonio, sin ege stulte prezentante kiel disĉiploj de io aŭ iu. Malgraŭ tiu neatenditaĵo la inspektoroj ricevis tre favoran impreson pri la tuta eksperimento.

Cl.- Restas al ILEI nun analizi tiun ĉi eksperimenton, por ke venontaj ankoraŭ pli agrable disvolviĝu. Estas tute certe helpe de similaj demonstroj interlernejaj, ke esperanto iom post iom konkeros firmajn poziciojn en la lerneajn instru-planajn.

A.- Vi aŭdis elsendon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !